

le monde de l'ESPERANTO

608 609

numéro

2021-02



DOSSIER

Lerni Esperanton

ACTUALITÉS

La boutique d'Espéranto-France
Hector Hodler : une posture pacifique

PAGE 21

PAGE 26

- L'actualité de l'espéranto
- La vie de l'association
- Culture et voyages

espéranto
France

Dans la boutique d'Espéranto-France...

catalogue et commande en ligne sur <https://butiko-esperanto-france.org>



Nouveau !
12 €

Ĉiuj super herooj. La pokalo de ĉiuj

Ĉiuj Super-herooj est la traduction en espéranto de *Tous Super héros*, une bande dessinée ludique qui invite les enfants comme les grands à devenir des défenseurs de l'égalité et de la solidarité...

Elle a été imaginée par Lilian Thuram, champion du monde de football en 1998 et d'Europe en 2000, avec la complicité du scénariste Jean-Christophe Camus et du dessinateur Benjamin Chaud.



Stranga malapero

Livre facile pour débutants (niveau A1)
avec exercices et enregistrement audio

L'histoire se passe en Corse. C'est la fin de l'année scolaire et les élèves préparent L'Avare de Molière, une pièce de théâtre. Mais il se passe des choses bizarres : un étrange personnage apparaît et le père de Carla et d'Enzo disparaît...

Stranga malapero (Une étrange disparition) est un petit roman de 40 pages qui permet aux élèves débutants de commencer leurs premières lectures. Richement illustré, il est accompagné d'exercices et d'un support audio.



9 €



Metodo 11


(édition 2020)

9 € l'unité

(ou 6 € l'unité par lot de 10)



1 €



12 €



12,50 €



offre groupée :
les 2 dictionnaires

20 €

le monde de l'ESPERANTO

numéro 608-609

éditorial •

frontartikolo



Chères lectrices, chers lecteurs,

J'espère tout d'abord que ce numéro estival vous trouvera en pleine forme, ayant apprécié la reprise de nombreuses rencontres et réunions qui nous ont tant manqué après la longue période de distanciation que nous avons vécue bien que nous ne puissions pas encore retrouver une vie normale.

L'espéranto est toujours vigoureux et les nouveautés ne manquent pas : musique, vidéos, livres, festivals et bien d'autres projets originaux nous prouvent que la langue est toujours vivante quoi qu'il arrive. Le foisonnement d'activités sur internet est la preuve de ce dynamisme, bien que le virtuel ne puisse remplacer le réel. Mais cette capacité d'adaptation de l'espéranto comme des espéranto-phones est un signe encourageant de plus pour l'avenir.

La rentrée est là et je vous souhaite une bonne reprise des actions de promotion et d'enseignement de notre belle langue. Utilisez les matériels modernes et de qualité qu'Espéranto-France met à votre disposition pour votre activité locale et n'oubliez pas de participer à la grande enquête que nous avons relancée pour cette fin d'année (voir p. 35) !

Bruno Flochon, président d'Espéranto-France

Karaj gelegantoj,

Mi unue esperas, ke tiu somera numero trovos vin plej sana kaj ke vi ĝuis denove renkontojn kaj kunsidojn, kiuj tiom mankis al ni post la longa distanciĝo, kiun ni travivis, eĉ se ni ankoraŭ ne povas havi denove normalan vivon.

Esperanto daŭre viglas kaj novaĵoj ne mankas: muziko, filmetoj, libroj, festivaloj, kaj multaj aliaj originalaj projektoj kiuj pruvas, ke la Lingvo estas viva, kio ajn okazu. La bunteco de retaj aktivaĵoj pruvas tiun dinamismon, eĉ se virtualeco ne povas anstataŭi ĉeeston. Sed tiu adaptebleco de Esperanto kaj de esperantistoj estas kuraĝiga signo por la estonteco.

La rekomenco de la kursoj alvenis kaj mi deziras al vi bonan ekon de instru- kaj informagadoj de nia bela lingvo. Utiligu la modernajn kaj kvalitajn materialojn, kiujn Esperanto-France disponigas por via loka agado kaj ne forgesu partopreni la grandan enketon, kiun ni relanĉis por tiu jarfino (vidu p. 35)!

Bruno Flochon, prezidanto de Esperanto-France

Sommaire

ACTUALITÉS

- Agadoj en Azio p. 4
- Kial juna instruisto pri fremda lingvo lernis ankaŭ Esperanton p. 6
- Abundas la projektoj en Afriko! p. 9

DOSSIER

- Lerni Esperanton p. 11

ASOCIA VIVO

- Praktikado de la lingvo en Kvinpetalo p. 20
- En la butikoj de Esperanto-France p. 21
- Festivalo "NATURist' por nova mondo" p. 24

KULTURO

- Hector Hodler p. 26
- Novaj libroj p. 28
- Novaj albumoj p. 33

Revue d'espéranto fondée en 1908,
éditée par Esperanto-France,
4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris
Tél. 01 42 786 886 - www.esperanto-france.org
Tout (sauf réd.) : info@esperanto-france.org
Trimestriel : 4 n° par an - Dépôt légal à parution
Tous droits de reproduction réservés

Les opinions exprimées n'engagent que leurs auteurs et ne représentent pas nécessairement celles de l'association ou de la rédaction.
Directeur de publication : B. Flochon
Rédacteur en chef : Claude Nourmont
mondo@esperanto-france.org
Envoi des articles 1 mois avant parution

Liste des contributeurs :

Adjévi Adjé, Afrika Revuo, Aŭstralia Esperanto-Asocio, B. Behra, E. Byelongo, G. Camy, E. De Zilah, N. Dankova, P. Dieumegard, P. Dubourg Glatigny, K. Ducloyer, B. Flochon, Eurokka, L. Gabalda, A. Jausions, Chen Ji, La Kokcinelo, E. Ludwig, A. Mmayinda, J. Muhire, L. Patas d'Illiers, E. Richard, M. Simba, Staĝintoj kun D. Loison, G. Stambach, G. Tabard, P. Vilain, Vinilkosmo, Sibayama Zyun'iti

Crédits photographiques : B. Moon et suivant indications

Publicité/annonces : à la rédaction

Impression : onlineprinters.fr
Imprimé en octobre 2021
Mise en page : Emmanuelle Richard

ISSN 1628-1942

Fabriko de novigado

La prezidanto de la aŭstralia Esperanto-asocio & magistratano Abrahamzadeh malfermas Esperanto-centron.

Celo inda kaj plaĉa estas (re)vidi vin kadre de ĉeesta Esperanto-kongreso grandskala en nia lando, Aŭstralio! Ĉu la 12-a Azia-Oceania Kongreso post la 11-a en Busan, Sud-Koreio, 2022? Eble ankaŭ vi memoras kaj sopiras tian etoson de antaŭ preskaŭ dudek kvin jaroj, gekaraj – en la prestiĝa Adelaide Convention Centre:
<https://uea.org/kongresoj/UK/1997>
<https://www.adelaidecc.com.au/>

En aŭstralia socio iu figuro tragika, sed aliflanke komptega kaj pri la porpacaj idealoj de Esperantismo ekstreme simpatia, estas Magistratano de Adelajdo sinjoro Arman Abrahamzadeh OAM. (OAM signifas ĉi tie premion de la registaro al meritoplenaj bonuloj.) En 1997 unu monaton post la 82a Universala Kongreso, Arman kune kun la gepatroj, kaj du fratinoj alvenis en Adelajdon kiel rifuĝintoj el Irano. La tuta familio finance prosperis kaj post nelonge ĉiuj kvin familianoj ĝuis respekton de la tuta komunumo.

Arman Abrahamzadeh – Australian of the Year
<https://www.australianoftheyear.org.au/recipients/arman-abrahamzadeh/1419/>

Arman dediĉis sin por elimini perforton kontraŭ virinoj kaj por realigi la mondan pacon. Tiucele antaŭhieraŭ li oficiale malfermis ‘lernejon’ meze de la urbocentro: **Baha’i & Esperanto Education Services.**



La prezidanto de la Aŭstralia Esperanto Asocio, Sandor Horvath, partoprenis kortuŝan ceremonieton, kiu movis lin per siaj propraj vortoj aldoni:

Ekzistas multaj manieroj antaŭenigi Esperanton. Refoje, nia Paŭlo (“ne la apostolo”) surprizis nin. Li organizis la luadon de spaco en la “The Innovation Factory” por... instrui Esperanton al bahaanoj kaj la ĝenerala publiko. La loko estas organizata de la Adelajda Urba Konsilio (Adelaide City Council) kaj Paŭlo estas en bona kompanio kun multaj junaj dinamikaj homoj laborantaj pri diversaj pioniraj projektoj. Mi tre esperas, ke tiu nova iniciato allogos kelkajn homojn al Esperanto. Sandor Horvath.

Dankojn al Alfredo, Arman kaj Sandor.



De maldekstre: Sandor (arlekeneska ĉemizo), Arman, Paŭlo, 25-jara Alfredo Cabado, Community Manger, The Innovation Factory.
60 Halifax Street. Adelaide. 5000. Australia.

Agadoj en Ĉinio

Karaj, mi dividu kun vi la E-novaĵojn el Ĉinio:

Ĉina esperantisto prezidis agadon por Ĉina Tago de UN

La 20-a de aprilo estas la **Ĉina Tago de Unuiĝintaj Nacioj**. Por festi la tagon la Ĉina Libra Societo sub Unuiĝintaj Nacioj okazigis tri agadojn pri ideografio, nome, simboloj de la liangzhua kulturo, dongbaaj skriboj kaj skriboj sur bestostoj kaj tri rila-

Nova Esperanto-muzeo

Nia nomo estas **Neprofitocela Organizo Esperanto Jokohama**.

Je 2021-04-23, ni havis la 6an fondotagon, kaj memore al tio, ni inaŭguris Esperanto-Muzeon Jokohaman, en loĝkvartalo de urbo Jokohama (la urbo de la 92a UK en 2007). La Muzeo (konstruaĵo entute) estas propra posedaĵo de ni.

En 2021-04-25, ni havis Malferman Tagon nur al esperantistoj, kaj ni esperas havi inaŭguron al la civitanoj, al kiuj ni ja celis la muzeon – sed pro la KOVIMa pandemio, tio okazos espereble post kelkaj monatoj.

La muzeo plenumiĝis dank’ al bonkora monofero de anonima subtenanto, kaj kolektiĝis pli ol sep mil libroj el esperantistoj el Japanio. Daŭras katalogigo de la libroj.

Sibayama Zyun’iti



Ekstere, oni vidas ŝtofan flagon – kion ni planas anstataŭigi per plasta montranelo.

taj mondaj heredaĵoj – antikvaj urb-ruinoj ĉe Liangzhu, antikva urbo ĉe Lijiang kaj Yin-ruinoj. De la 19-a ĝis la 21-a de aprilo, la tri agadoj interrete okazis per la softvaro Zoom kaj en la formoj de muzea gvido, lingva kurso kaj prelego.

Prezidis la duan agadon Xiao Dun, ĉina esperantisto kaj vicprezidanto de la Ĉina Libro Societo. Li prezentis 11 eksponaĵojn rilatajn al lingvoj kaj skriboj, kiuj estis donacitaj de diversaj landoj al Unuiĝintaj Nacioj.

en Jokohamo, Japanio



Ekspozicio en la unua etaĝo, nome Ĉambro Zamenhof. Nun oni ekspozicias unuajn lernolibrojn de diversaj nacioj, kolektitajn pere de esperantista reto.



Enirpordo al la Ĉambro Hodler, plena de libroj esperantaj.

Publikigita unua numero 2021 de Unesko-Kuriero

La unua numero 2021 de *Unesko-Kuriero*, eldonita de El Popola Ĉinio kaj subtenita de la Universala Esperanto-Asocio, estis publikigita en UNESDOC antaŭ kelkaj tagoj. En ĝia traduko partoprenis 12 esperantistoj el 7 landoj.

La temo de tiu numero estas *Oceano: Estas tempo por turni la tajdon*.

Weilun-stipendio disdonita por E-lernado

La 13-an de januaro okazis la premi-ceremonio pri Weilun-stipendio en la bazlernejo Baiyangshujie en la urbo Taiyuan de la provinco Shanxi, Ĉinio. La lernejestroj donis atestilojn kaj monpremiojn al 56 gajnintoj de la premio Verda Stelo kaj 16 gajnintoj de la premio Verda Semo. En decembro 2019 fondiĝis la stipendio financita de la profesoro Li Weilun el la Pekina Lingva kaj Kultura Universitato, por subteni Esperantan lernadon kaj aktivadon en la lernejo. La stipendio en la sumo de 40 000 juanoj (ĉ. 6 100 usonaj dolaroj) estas disdonacitaj al instruistoj kaj lernantoj de la lernejo.

Rakontoj pri Esperanto iris al universitato

La 23-an de februaro en la Lingva Muzeo de la Ŝanhaja Universitato de Internaciaj Studoj okazis intervjuo kun Zhou Tianhao. S-ro Zhou Tianhao, vicprezidanto de la Ŝanhaja Fremdlingva Aŭdvid-Eldonejo, konstanta komitatano de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj prezidanto de la Ŝanhaja Esperanto-Asocio, rakontis pri la historio de Esperanto kaj prezentis la karakterizaĵojn, aplikojn kaj evoluojn de Esperanto.

Xiamen-a E-Asocio helpas kamparanojn eliri el malriĉeco

En lastaj kelkaj monatoj, multaj kamparanoj estis helpitaj de prezidanto de Xiamen-a Esperanto-Asocio Wang Yamin, ĝiaj vicprezidantoj Guo Jingfen, Yu Ximei, Deng Xiaozhong kaj konstanta komitatano Fan Zhongping kaj membrino Chen Sufang. La esperantistoj helpis lokajn kamparanojn vendi agrikulturajn pro-

duktojn per realtempa elsendado.

Inter la 11-a de oktobro 2020 kaj la fino de februaro 2021, membroj de la asocio elsendis pli ol 20 fojojn, kaj tiel forvendiĝis 4 000 kilogramoj da loka rizo kaj 300 skatoloj da lokaj oranĝoj, kaj sume 200 000 homoj spektis la elsendojn. Sekve, la asocio daŭre helpas vendadon per tiaj elsendoj por kontribui al la vilaĝa prosperiĝo.

Komenciĝis Esperanto-kurso en Profesiateknika Kolegio de Shaanxi

En la urbo Xi'an, nova nedeviga kurso pri Esperanto komenciĝis en la Profesiateknika Kolegio de Shaanxi en la 18-a de marto. Inter la jaroj 2017 kaj 2019, tiu kolegio kvinfoje aranĝis Esperanto-kursojn, kaj ĉi-foje 120 studentoj lernas en la kurso.

La kurson gvidas Che Xiangdong (Orientalo), instruisto de la kolegio, vicesekretario de Xi'an-a Esperanto-Asocio kaj ILEI-ano.

Esperantistoj de Jiamusi-urbo vizitis tombon de Verda Majo

La 1-an de aprilo esperantistoj de Jiamusi-urbo, Heilongjiang-provinco, nordorienta Ĉinio, vizitis la tombon de Verda Majo en la martir-tombejo de Jiamusi. Ili rememoris ŝiajn kontribuojn dum la Kontraŭjapana Rezistmilito. Al la aktiveco ĉeestis Wang Qingjia, prezidanto de la Heilongjiang-a Esperanto-Asocio. En la tombejo, esperantistoj omaĝis al Verda Majo per floroj kaj silente funebris tri minutojn.

Poste, Liu Xiumei, instruisto por E-komencantoj, diskonigis al ili pri la vivo de Verda Majo. Ankaŭ Wang Qingjia proponis al ili bone lerni Esperanton kaj fari sian kontribuon kiel Verda Majo por disvolviĝo de la lingvo kaj pordmalfermo de Ĉinio.

Chen Ji

Direktoro de Oficejo de Ĉina Esperanto-Ligo
Direktoro de E-sekcio de El Popola Ĉinio
Komitatano A de Ĉina Esperanto-Ligo
Tel: 86 10 6899613 ; 13126784506
Adr. P.O.Kesto 77, Beijing CN-100037, Ĉinio

Por pli da informoj bonvolu viziti:

<https://www.facebook.com/Ĉina-Esperanto-Ligo-610175949497129>

<https://www.facebook.com/Ĉina-Fokuso-China-Focus-Esperanto-1753507848248309>

<http://www.espero.com.cn/index.htm>

Kial juna instruisto pri fremda lingvo lernis ankaŭ Esperanton

Diversajn, sed parencajn lingvojn mi jam aŭdis en la lulilo ĝis antaŭ la ekfrekventado de la bublernejo, je la tria jaro de mia vivo. Tiuj dialektoj estis alzaca alemana dialekto de la valo de Munster, la viena versio de la germana lingvo, la svisa dialekto de Bern pro la elsendoj de la svisa radio Beromünster kaj la germana lingvo de la sudgermanaj radioj, kiujn aŭskultis mia familio – la televido ja ankoraŭ ne ekzistis en la 50-aj jaroj. Kiel multaj alzacanoj tiamaj mi eniris la bublernejon je la trijaraĝo sen koni iun ajn vorton de la franca lingvo. Kuraĝigite de miaj gepatroj mi fervore obeis la afablan instruistinon kaj baldaŭ fieris pri la progresoj.

Ofte oni nun ankoraŭ aŭdas kaj legas en Alzaco, ke la instruistoj malpermesis al la etaj gealzacanoj paroli dialekte inter si dum la paŭzoj. Tion miaj geinstruistoj ne postulis, eĉ ne poste, en la elementa lernejo. Mi konfesu, ke tamen niaj kamaradinoj baldaŭ pli volonte parolis france inter si ol multaj knaboj. Oni ja ĉie aŭdis kaj legis, ke ŝikas paroli la francan, la plej belan lingvon de la mondo!

Mi havis la bonŝancon havi gepatrojn, kiuj laboris dum pluraj jaroj en internacia aŭstra luksa hotelo, kie ili ĉiutage aŭdis plej diversajn lingvojn. La kuraĝigo lerni lingvojn do venis ankaŭ de ili.

Ĉar mi havis la bonŝancon tre ofte pasigi miajn somerajn feriojn ĉe familianoj, kiuj loĝis en diversaj dialektozonoj de Aŭstrio (Stirio, Karintio) kaj Sudtirolo en Italio, mia pria aŭdkapablo ankaŭ tiel riĉiĝis. (Aktuale, en 2020, mi konstatas kun plezuro, ke en la germanlingvaj televido-kanaloj la dialektoj denove moĝosas.)

Ĉiuj tiuj spertoj instigis min iĝi instruisto pri la germana lingvo. Mia unua posteno estis en la departemento Vosges, kie la gelernantoj parolis ekskluzive la francan lingvon, kun ĉarma loka akĉento. Kvankam, kiel ankaŭ poste, mi havis bonegajn gelernantojn, multis la gelernantoj, kiuj malŝatis la germanan, ĉar la

memoro de la nazia okupacio ankoraŭ suferigis la homojn. Sed mi ja estis juna kaj entuziasma kaj la mesaĝo, kiun ekde mia junaĝo enkapigis al mi miaj gepatroj, ja estis frateca kunlaborado inter popoloj en Eŭropo.

Post du jaroj mi ricevis postenon en mia hejma alzaca kolegio-liceo, kie mi retrovis miajn eksajn instruistojn, kiuj nun iĝis gekolegoj kaj geamikoj. Ĉar klarvida ĝenerala inspektoro Georges Holderith ellaboris postuleman metodon por la parolantoj de la alzacaj dialektoj, mi uzis ĝin kun entuziamo. La rezultoj estis impresaj, ĉar ekde la unuaj mezlernejaj klasoj la gelernantoj jam legis senprobleme librojn en la germana lingvo kaj aŭskultis senprobleme la germanlingvaj radioj kaj televidojn.

Sed malfaciloj daŭris por la pli kaj pli multnombraj gelernantoj, kiuj ne plu parolis la dialekton, ĉar la gepatroj konversaciis kun ili hejme nur en la franca, timante ke ili ne estos sufiĉe kapablaj en la franca. Tio ja estis la konsiloj de la ŝtata propagando, kiu deziris elradiki ĉion ajn germanan.

Kun tiuj gelernantoj mi do troviĝis – kiel en la departemento Vosges – antaŭ komencantoj. Ĉar mi komencis instrui, kiam estis alvenintaj de Usono la aŭdvidaj metodoj, per kiuj eblis tuj instrui al la gelernantoj la ĝustan akĉenton kaj plibonigi la aŭdkapablon, mi kun entuziasmo min trejniis kaj mem spertiĝis dum kunvenoj de la regiona asocio de la instruistoj pri fremdaj lingvoj, kie ofte ankaŭ partoprenis inspektoroj. Ni observis nian farmanieron, niajn progresojn, niajn erarojn, niajn sukcesojn kaj malsukcesojn. Junaj instruistoj ja opinias, ke eblas gvidi absolute ĉiujn gelernantojn al pinta kapablo en la praktikado de la nova lingvo! Tion oni ja ankaŭ enkapigis al ni! Ĉiamaniere: tio restu celo

por ia ajn instruisto, eĉ se nur virtuala celo.

Necesas menciigi, ke en la komenco de la 70-aj jaroj ankaŭ la francaj aŭtoroj de tiaj metodoj, plej ofte inspektoroj de la Nacia Edukado, mem ne longe elprovis siajn metodojn kaj postulis striktan sekvon de la gvidlibraj principoj. Sed iom post iom klaris, ke necesas adapti la teknikojn al la gelernantoj.

Eklerno de nova lingvo

Tial mi decidis lerni novan lingvon por min observi dum tia lernado. Sed kiun lingvon elekti? Troviĝis, ke tute hazarde mi rimarkis artikoleton, kiu proponis perkorespondan kurson de la internacia lingvo Esperanto. Kial ne elekti Esperanton? Nu, la kvazaŭ senesceptaj reguloj kaj la fonetika ortografio estis ideala studobjekto, eĉ se mankis la amasa nombro da esceptoj, kiuj pli komplikigas la akiradon de fremda etna aŭ nacia lingvo. Sed tiu Esperanto tiklis min.

Mi do enskribiĝis kaj ricevis la libron *Nouveau cours rationnel d'espéranto* (SAT-Amikaro). Jen surprizo: metodo tiam tute tradicia bazita sur lernado de vortlistoj, tradukado de kaj al Esperanto kaj... sen iu ajn desegno priskribebla kaj sen iu ajn sondokumento! Min gvidis kolego, sinjoro Etienne, al kiu mi regule sendis miajn taskojn por korektado! Post kelkaj monatoj samideano Colnot, la administranto de la perkoresponda kurso de la tiama *Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espé-*

ranto min invitis al la kulturdomo Philippe Desforges en Nancy. Tuj li alparolis min en Esperanto kaj partoprenigis min al la konversacia kurso kaj la miraklo okazis: sen iama antaŭa aŭdado de la lingvo kaj kontrolo de mia elparolo mi sukcesis kundiskuti en tiu paroliga rondo. Vespere mi kapablis sekvi kvazaŭ senprobleme preleg-





on de profesoro pri filozofio de Metz pri arto en Hindio. Tiu profesoro konfesis, ke nur de kelkaj monatoj li lernis Esperanton per la Metodo *Assimil*! La preleginto iĝis poste fama verkisto kaj redaktoro de la revuo *La Gazeto*: Eugène de Zilah!

Jen kunveno, kiu kuraĝigis min al plulernado sub la gvido de pastro Roger Degrelle, studante tute klasike la kajeron *Por la Praktikantoj* (Kulturdomo de la francaj esperantistoj) kaj poste *Paŝoj al Plena Posedo* (William Auld). Kaj ĝuste en Grésillon mi trapasis mian Pedagogian Ateston de Franca Esperanto-Instituto kun la severa kaj postulema ĵuriano Jeaninne Vincent kaj la inspektoro pri la angla lingvo Pierre Babin.

Kaj mi ekgvidis Esperantokurson en la kolegio-liceo de Munster al kelkaj dekoj da gelernantoj. Min tiam kontaktis la prezidanto de UFE (Unuiĝo Franca por Esperanto), Jean-Louis Texier, kiu petis, ke mi verku kurson de Esperanto. Tiel naskiĝis *Metodo 11* (unua franca versio de la Zagreba Metodo) kaj ties kompleto *Metodo 12*, *Metodo 10* (prezento de Esperanto dum semajnfinaĵoj), *Metodo 15* (por paroligo de jamaj lernintoj) kaj fine, kunlabore kun mia koleginino Renée Triolle, licea instruistino pri la rusa, la memlerna kurso *Nouveau Cours d'espéranto*.

Unua konstato, pri kiu necesas insisti koncerne la lernadon de Esperanto, estas la jeno: akiro de ĝusta prononcado de Esperanto eblas, eĉ kiam oni ne disponas pri registritaj tekstoj kaj ekzercoj, post nura apliko de la prononco-reguloj, almenaŭ por eŭropano. Mia unua kontakto kun Esperanto-parolanto post nura perkoresponda lernado sen antaŭa aŭdo de la parolata lingvo tion demonstris. La jeno maleblas por iu ajn etna lingvo.

Dua konstato: ankaŭ per tradicia laŭtraduka metodo, kia estis tiam *Nouveau Cours Rationnel d'Espéranto*, eblas lerni Esperanton kaj ĝin flue paroli, kondiĉe, ke oni majstru la gramatikon de sia denaska lingvo kaj apliku la vortkonstruajn regulojn de la Internacia Lingvo.

Same eblas deklari, ke post kompleta kurso de Esperanto, klera lernanto kiu havigas al si vortaron, kapablos legi iun ajn esperantlingvan literaturon kaj kompreni verkon sen miskompreno¹, kio absolute ne estas garantiata post lernado de ia ajn alia fremda lingvo.

Ni tamen aldonu, ke ege utilas daŭre aŭskulti radioelsendojn kaj aliajn registraĵojn por kompreni rapidan paroladon.

La avantaĝoj kaj mankoj de pure aŭdvidaj metodoj

La ĉefa principo de aŭdvida metodo estas la tuja bano en la nova lingvo per ofta aŭdado kaj ripetado, tiel ke la sonoj kaj la strukturoj de la lingvo iom post iom enmemoriĝu, kaj tio eĉ sen apliko de antaŭe lernita gramatika regulo. Dum longaj jaroj la “dogmo” enkapigita al la lingvoinstruistoj trejnitaj por la aŭdvidaj metodoj estis: nenia gramatika klarigo. Necesas perfekta lingvo de denaskuloj. Nu: oni agnosku, ke la kompreno de la parolata lingvo tiamaniere pliboniĝis. Sciatas, ke komence de la sepdekaj jaroj ne maloftis la instruistoj pri fremdaj lingvoj,

1 Tio ne validas, kiam enas aludoj al eventoj en la esperantista medio, reflektante la kulturalan vivon de la lingvo.


kiuj ne flue parolis, ne kapablis kompreni denaskulojn, kiam ili antaŭe ne restadis en koncerna alilingva lando kaj skribis ian “tradukan” lingvon.

Same dogma estis la principo: nenia traduko! La gelernantoj kaptu per si mem unue la ĝeneralan signifon de la tuta teksto kaj poste iom post iom la detalojn. La gepatran lingvon oni kvazaŭ neniam aŭ nur ege malofte uzu por klarigi. Iuj aŭtoroj de aŭdvidaj metodoj eĉ postulis, ke la instruistoj lernigu la malregulajn verbojn sen la traduko, ĉar ununura traduko – aldonita post la malregulaj verboj lernotaj – ja neniel povas ĝusti en iu ajn situacio, kio veras, sed tamen ia baza traduko nepras.

Ankaŭ neniel decis lerni vortlistojn kun tradukoj! Ĉio tio pro la sanktigita principo de natura lernado de lingvoj, laŭ la natura lernado de la gepatra lingvo fare de infanoj.

Tiel miloj da gelernantoj papage ripetis skeĉerojn kaj lernis skeĉojn parkere sen ĉiam vere kompreni, kion ili lernis. Tio daŭris dum kelkaj jaroj, des pli ke tiujn metodojn praktikis junaj geinstruistoj, kiuj aplikis lernitaĵojn. Pli maljunaj geinstruistoj, kiuj iom post iom estis devigataj sin adapti, ja miris, sed unue simple obeis.

Gravan evidentaĵon oni tutcerte neglektis aŭ humile silentigis: tri horoj da instruado de la lingvo semajne en 30-kapa klaso ja ne povas anstataŭi daŭran tuttagan aŭdadon de la gepatra lingvo en la propra hejmo. Krome: plejofte la gelernantoj hejme ne posedis la aŭdigajn materialojn



Esperanto-France plurfoje reeldonis la lernolibron *Metodo 11*

(tiam: magnetofonajn bendojn, poste KD-legilojn), ili do ne povis centprocente memori la ĝustan prononcadon. Krome la klasoj iĝis pli kaj pli diversnivelaĵ, kio igis la instruadon ankoraŭ pli malfacila. Nepris ankaŭ, ke la gelernantoj hejme serioze plulernu mem².

Fine: ĉiu ajn ankaŭ mem kapablas testisian kapablon paroli fremdan lingvon. Li/ŝi aŭskultu ĉiutagajn fremdlingvajnsendojn, legu librojn en la lernata lingvo, sin observu dum diskutado kun parolantoj de la lernata lingvo.

Li/ŝi ankaŭ ne hezitu trapasi ekzamenojn laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj, kiu iĝis vera progreso en la mezurado de la kompren-, parol- kaj skribkapablo de fremda lingvo.

Bedaŭra konstato: francaj instruistoj pri lingvoj sin sentas kulpaj, kiam oni radie aŭ televide daŭre gurdadas: la francaj gelernantoj ne kapablas kompreni kaj paroli fremdajn lingvojn. Al miaj gekolegoj mi diras: ĉu en aliaj fakoj ĉiuj gelernantoj estas kapablaj? Kial iuj fiaskas dum la ekzamenoj en aliaj fakoj? Ĉu en la post-

² Dume iu pedagogia skolo distrumpetis, ke necesas malpermesi taskojn postlerneĵajn hejme, ĉar tio malavantaĝigas la gelernantojn, kiuj ne bonŝansas havi gepatrojn, kiuj povas helpi al ili. Gelernantoj nelernemaj tuj enkapigis tiun mesaĝon!

lerneja vivo ili ĉiutage devas pruvi, ke ili estas kapablaj en tiuj fakoj? Certe ne! Kial nur la instruado de fremdaj lingvoj fiaskas?

Konsiloj

Kvankam la instruistoj pri lingvoj ankaŭ iom plimultiĝis en la movado, la plej granda parto de la instruistoj pri Esperanto daŭre estas neprofesiaj instruistoj. Mi do instigas ilin sekvi la konsilojn en la gvidlibroj de la diversaj metodoj.

La gelernantoj profitu la ekziston de aŭdvida materialo por aŭskulti la lingvon. Ili tamen ankaŭ studu la gramatikajn regulojn, la signifon de la afiksoj, la novan vortprovizon kaj faru la diversajn ekzercojn unue parole, poste skribe. Ili rerakontu la skeĉojn aŭ la tekstojn. Ofte la metodoj proponas desegnojn kaj fotojn, per kiuj eblas reuzi la vortprovizon de la leciono. La gelernantoj sin trejnu pere de ili.

Tuj kiam la gelernantoj havas la impreson, ke ili pli libere parolas kaj skribas, ili verku mem rakontojn.

Ili tre baldaŭ aŭskultu esperantlingvajn radiojn. Komence ili ne ĉion komprenos, sed iom post iom, jes. Iuj radioj proponas akompanan tekston aŭ la eblecon malrapidigi la aŭdadon. Ili profitu tiujn novajn eblecojn.

Gravas ankaŭ, ke ili daŭrigu la lernadon per perfektiga kurso, ne kontentigu sin per supraĵa scio.

Regula studado parola kaj skriba garantios al ili rapidajn progresojn.

Ili kontaktu aliajn geesperantistojn, ĉefe eksterlandajn kaj aliĝu al plej najbara grupo.

Ankaŭ por Esperanto ekzistas ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro por Lingvoj.

Konsultu <https://edukado.net/>

Lasta utila rimarko

Nesciantoj ofte opinias, ke la esperantistoj volas ununuran universalan mondlingvon! Ne! Esperantistoj klopodas disvastigi tutmondan supernacian, superetnan helplingvon! La aliaj lingvoj pluekzistu kaj pluriĉiĝu!

Ni esperantistoj ja eĉ rajtas fieri pri la iniciato de skipo da samideanoj (Chuck Smith kaj la skipo de e@i en Nitro, Slovakio), kiuj lanĉis *Polyglot Gathering* (Kunveno de poliglotoj), ariganta ĉiujare plurajn centojn da gejunuloj, kiuj plezurigas paroli kiel eble multajn diversajn lingvojn! Inter ili ankaŭ multaj esperantistoj. Gratulojn al ili!

Edmond Ludwig

Bezannes Esperanto

En France, dans la région de Reims, le groupe immobilier Plurial Novilia a récemment inauguré Bezannes Esperanto®, dans le cadre du projet Konekti : 5 maisons innovantes représentant les 5 continents, chacune étant conçue par un bureau d'architecture différent.



La maison Océanie. photo : <https://www.konekti.fr/bezannes-esperanto.html>

Ces maisons viennent étoffer un projet immobilier original qui se composait déjà de deux maisons connectées, de trois immeubles collectifs comprenant 53 logements locatifs, et d'un jardin thérapeutique.

Dès son démarrage en 2015, le projet **Bezannes Esperanto**® s'est fait remarquer par son caractère particulier et insolite. On peut depuis affirmer que les 5 maisons conçues, qui s'inscrivent dans le projet immobilier global **Konekti**, réinventent l'habitat social au cœur des villes. La réflexion de base ayant porté chaque projet est une réflexion élargie autour de la manière dont cultures et traditions viennent enrichir l'habitat au quotidien. Chaque architecte a ensuite conçu « sa » maison avec son vécu et celui de son pays d'origine, même s'il vit et travaille – parfois depuis longtemps – en France. Et Plurial Novilia a coordonné les échanges entre tous les architectes.

Abundas la projektoj en Afriko!

Mazingira, kiu intencas rearbarigi monteton, projekto de Elysée Bielongo, por krei lingvistikan kurson en Kongo, projekto de Joël Muhire por kultivi kaj kreskigi...

Rearbarigo de monto Tsin'gati, Tanzanio

Mramba Simba komencis la rearbarigon de monto Tsin'gati, kiu troviĝas en lia tereno de 4 vilaĝoj (kie li estas vilaĝar-estro).

Mramba jam komencis antaŭ du jaroj je la piedo de la monto; kaj nun intencas planti diversajn arbojn, kiujn li jam kultivis. Krome necesas kaj kostas gardi la plantaĵon, por protekti la arbojn.

Fotovoltaiko-projekto je UEC

Universitato de Espero en DR Kongo
(kristana / metodista)

Nun ĉi tiu universitato havas esperantistan administranton, Elysée Bielongo.

La celo estas krei tie la unuan universitan kurson pri interlingvistiko en Afriko. Sed la problemoj estas senfinaj; la unua estas manko de elektro. La malnova benzine funkcia generilo rompiĝis kaj nun ni pensas instali sunpanelojn. Jen la bazaj informoj en Vikipedio: https://eo.wikipedia.org/wiki/Universitato_Espero_de_Kongo

Agrikultura projekto de Joël Muhire

Rutšuru (D.R. Kongo)

Joël skribis: "Ni luprenis kampon per pruntita mono, ne malproksime de mia hejmo kaj ni intencas ensemi fazeolojn kaj maizojn; legomoj estas postulemaj kaj ne donas multan monon tie ĉi. Akvo por akvumi ne necesas, sufiĉas la pluvo. Rondo Esperantista de Kiwanja havas nun proksimume 40 membrojn, ĉar la varbado daŭras. Mi kreskis kultivante, studis agrikulturon."

Agado por afrikaj lingvoj, seksa egaleco kaj Esperanto, en Togolando

Profite la restadon en Togolando de Paula R., studentino en sevilja universitato, Hispanio, kadre de **Afrika Reto de Kolektiva Agado por la Lingva kaj Kultura Identecoj** (ARKALKI), ni aranĝis dekon da interagaj aktivajoj, inkluzive prezenton de Esperanto kaj mallongajn lingvajn kursetojn, pri kultura, lingva digneco kaj rajtegaleco inter viroj kaj virinoj kun dua-, triagradaj lernejoj kaj ankaŭ kun personoj kun universitata edukiteco en la finiĝantaj julio kaj aŭgusto 2021.

Ĉio ĉi povis okazi danke al informmaterialoj kaj esperantaĵoj ricevataj antaŭe de **Esperanto-France**, subteno de la universitato de Seviljo pere de prof. Vicente Manzano-Arrondo, de UEA kaj kompreneble ankaŭ de lokaj fortoj. Al ĉiuj mi diras tie ĉi dankegon!

Menciindas, ke unu el tiuj interagaj aktivajoj eĉ koincidis kun **Esperanto-Tago** la 26-an de julio. Do ni uzis la okazon por kunmanĝi ne nur inter esperantistoj, sed ankaŭ kun neesperantistoj en amika etoso.

La lasta interaga kunveno okazos sabate la 28-an de aŭgusto 2021. Ĝi kunigos plenkreskulojn de diversaj kulturaj horizontoj, kiuj kapablas teni debaton en lokaj lingvoj pri kulturaj kaj lingvaj problemoj. Triono de tiuj personoj estas ne-esperantistoj, sed lingvo-instruistoj en dua- kaj triagradaj lernejoj. La plejmulto de ili jam komencis lerneti Esperanton.

Adjévi Adjé



Afriko kaj la internacia Semajno pri amikeco

Per renkontiĝo afrikaj kaj alikontinentaj esperantistoj markis la celebradon de la ĉi-jara internacia *Semajno pri amikeco* sabate, la 27-an de aprilo. La programo, pro la limigoj rilate al la korona viruso, disvolviĝis nur virtuale dum pluraj horoj kun partopreno de dudeko da esperantistoj el Afriko, Ameriko, Azio kaj Eŭropo.

Laŭvice la partoprenantoj salutis kaj sin prezentis mallonge. Poste okazis spektado de la filmeto *Bona Amiko* realigita de Solidareco Bona Volo (SBV) de DR Kongo, bonvenigo nome de Afriko, prezento de memorfotoj pri la 73-a Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Togolando, mallongaj raportoj de la Afrika Komisiono kaj de reprezentantoj de Burundo, DR Kongo, Senegalo, Togolando pri Esperanto-aktivaĵoj en la respektivaj landoj. Siaflanke, Elisabeth Schwarze gvidis diskutrondon pri la delegita reto de UEA, Iván Mättig C. faris prezenton pri fruktodona amikeco pere de leteroj de la mondo kaj Keyhan Sayadpour pri siaj sciencaj agadoj en Afriko. Oni povis interalie ankaŭ aŭskulti vivavoĉe kantoprezenton de Joel Muhire, rigardi koncerteton de Zhou Mack kaj ankaŭ balafonan muzikon kun dancado de la neesperantista grupo Kanouya.

Menciindas, ke la ideo fari agadon kadre de la internacia *Semajno pri amikeco* venis de Claude Nourmont, kiu mem ne nur partoprenis, sed ankaŭ kontribuis per klarigoj pri aspekto de levita demando de partoprenanto. La tago entute estis okazo por ni afrikanoj kontakti kun alilandanoj, interŝanĝi, babili en amikeca etoso kun ili. Ĝi estis tute interesa sperto ankaŭ por tiuj ĉi malgraŭ kelkaj teknikaj problemoj ĉe la eventofino. Pli ol unu partopreninto retrorigarde povis per retpoŝtaĵo fari rimarkojn, kiuj povus utili

por ontaj elpaŝoj, ĉar la Afrika Komisiono kaj mi mem interesiĝas daŭrigi la vojon pri virtualaj Esperanto-programoj en la kontinento.

Dankon al ĉiuj partoprenintoj, kontribuintoj al la realigo de la tago. Apartan dankon al Jung Yuro "Unika", kiu volonte kunlaboris pri la teknika flanko. Ŝi bone kaj helpeme agis en la t.n. babilejo.

Adjévi Adjé



La registraĵon pri la tago oni povas rigardi per : <https://www.youtube.com/watch?v=n5QionSGLAs&t=6492s>

Afriko denove invitas kaj kongresas



Goreo, unu el la ekskursejoj



La 8-a Afrika Kongreso okazos en decembro 2022 en Tieso, 56 km oriente de Dakar en Senegalo.

Oni fidus, ke pandemiaj limigoj ĝis tiam estos grandparte superitaj. Aperis la unua bulteno de tiu kongreso.

La informilo pri la 8-a Afrika Kongreso 2022 estas elŝutebla ĉe:

<https://afrika.esperantujo.io/8-ake/pdf-dosieroj/>

Pliaj informoj: <http://afrika.esperantujo.io/8-ake>



Lerni Esperanton

Comme pour toute langue vivante la manière la plus évidente est l'apprentissage en présentiel. Le professeur est là pour faire parler les élèves, les stimuler, corriger leur prononciation ou des fautes de grammaire. Et l'effet « groupe » fait que les élèves se stimulent les uns les autres.

Mais le cours par correspondance est bien utile aussi. Le cours *ikurso*¹ est populaire chez les francophones. C'est tellement agréable de travailler quand on veut, d'être suivi personnellement par un correcteur – plus que correcteur on devrait dire un soutien à l'étude de la langue. En raison de la pandémie, ces cours se sont multipliés, étant donné les difficultés pour se réunir. Et puis certains veulent juste « goûter » un peu d'espéranto. D'où le succès de Duolingo² auprès de personnes même âgées, qui découvrent ainsi une nouvelle

langue. Certains se prennent au jeu, cherchent à rencontrer d'autres étudiants de la langue, et deviennent de fervents espérantistes !

Il y a aussi des méthodes plus traditionnelles. La méthode Assimil a eu un franc succès. Un tel succès que vient de paraître le Cahier d'exercices Espéranto d'Assimil, qui en fait n'est pas un simple cahier, mais une méthode pour apprendre par soi-même l'espéranto. Et si vous lisez le texte d'Edmond Ludwig, vous verrez qu'il rencontre un professeur qui a appris par cette méthode. Edmond Ludwig a lui-même appris l'espéranto un peu par hasard, en trouvant une publicité pour un cours d'espéranto. Et il a persévéré... Et il s'est aperçu que même sans avoir entendu la langue, il pouvait la prononcer correctement – ce qui ne serait pas possible pour d'autres langues, malgré les explications du professeur...

1 ikurso.fr

2 <https://www.duolingo.com/enroll/eo/fr/apprends-espéranto>

KER-ekzamenoj en Afriko

La 28-an de novembro 2020 estis la naŭa **Tutmonda Tago de UEA-ekzameno** laŭ la Komuna Eŭropa Referenckadro (KER). Sepdeko da kandidatoj en 12 urboj de 9 landoj de 4 kontinentoj partoprenis tiun tutmondan sesion, sub la elstara organizo de Katalin Kováts, redaktoro de <https://edukado.net>.

Unuafoje disvolviĝis en Afriko, precize en Kotonuo, Benino, tia ekzamen-sesio dank'

al Mireille Grosjean. Ekzameniĝis tiutage ĉe la niveloj B1 kaj B2 en la hotelo JoCa entute kvar beninaj esperantistoj, nome s-roj Cyprien Guiya, Goby A. Ahonon, Aubain Cocouvi Ekon kaj François Hounsounou. Por mi estis provo por spertiĝi. La ekzameno disvolviĝis en similaj kondiĉoj kiel la ŝtatekzamenoj en Benino.

“Mi tutkore dankas al Katalin Kováts kaj Mirejo Grosjean, kiuj proponis tiun

ŝancon al Afriko”, skribis la kandidato François Hounsounou. Pro tio, ke la KER-ekzameno konstruiĝis surbaze de la eŭropaj normoj, ĝian atestilon oni oficiale agnoskas kaj traktas kiel la aliajn lingvoekzamenajn diplomojn.

Numero 42, *Afrika Revuo*

Inscrivons-nous pour le KER-ekzameno !

Le Cadre européen commun de référence pour les langues (CECR en français – KER, Komuna Eŭropa Referenc-kadro, en espéranto) a été créé en 2001 par le Conseil de l'Europe (plus large que l'Union européenne).

Il fournit une base commune pour la conception des programmes, des diplômes et des certificats. Son but est de favoriser la mobilité éducative et professionnelle. Ce cadre a été conçu pour répondre à l'objectif général du Conseil de l'Europe qui est de « parvenir à une plus grande unité parmi ses membres » et d'atteindre ce but par l'« adoption d'une démarche commune dans le domaine culturel ». L'objectif affirmé est d'abord politique : asseoir la stabilité européenne en luttant contre « la xénophobie » et veiller au bon fonctionnement de la démocratie. Les langues et les cultures peuvent y contribuer par une meilleure connaissance des autres.

L'innovation principale de ce cadre consiste en une **échelle d'évaluation de la maîtrise d'une langue**, indépendante de l'organisme évaluateur, et transposable à n'importe quelle langue, contrairement aux autres systèmes d'évaluation qui sont souvent propres à un pays, voire à un organisme, et généralement applicables à une seule langue. Pour ces raisons, de plus en plus d'organismes évaluateurs alignent leurs niveaux d'évaluation sur l'échelle du CECR.

Cette échelle comprend 6 niveaux (A1-A2, B1-B2, C1-C2), centrés sur la communication. En France, ils sont repris dans le Code de l'éducation pour les différents cycles. Pour le baccalauréat, les élèves doivent atteindre le niveau B2 pour la langue vivante A et B1 pour la langue vivante B. Ce cadre a été repris pour environ 32 langues en Europe et il est maintenant accrédité pour le chinois, le coréen et l'arabe.

À l'initiative de Katalin Kováts, **le livret pédagogique a été traduit en espéranto, puis il a été accrédité par le Centre national hongrois de langue Origo de Budapest, pour 4 niveaux (A2, B1-B2 et C1).** À chaque niveau correspond une partie « écrit » et une partie « oral », que l'on peut passer séparément.

À ce jour environ 2500 personnes à travers le monde ont réussi l'examen en espéranto, dans au moins un niveau.

En 2020, malgré la pandémie, des examens ont eu lieu dans 12 villes de 9 pays (Japon, Chine, Vietnam, Russie, Belgique, Bénin, Brésil, Équateur et Mexique). La commission d'examen



d'UEA qui coordonne ce projet travaille maintenant à la mise en place d'un C2 [niveau « maîtrise de la langue »]. L'institut Origo de Budapest y met toutefois comme condition qu'au moins 150 personnes se montrent intéressées pour le mettre en place. La Fondation Edukado.net est de son côté prête à contribuer financièrement. Il faut savoir aussi que l'inscription à ces examens a un coût, mais que les clubs ou fédérations locaux d'espéranto sont souvent prêts à aider les candidats.

Il faut savoir que le CECR [et par conséquent le KER] a été critiqué pour se limiter essentiellement à la communication, en laissant de côté la partie culturelle et historique d'une langue, ce que prend plus en compte par exemple le FEI [Franca Esperanto-Instituto]. Mais la reconnaissance internationale du CECR-KER est incontestablement une grande réussite, car c'est un argument important du sérieux de notre langue, qui fonctionne et est validée « comme les grandes ».

On peut même considérer l'inscription à un quelconque niveau du KER comme un acte militant pour mettre en valeur l'espéranto. **Nous encourageons donc ceux qui ne l'ont pas fait à le passer** et ceux qui ont un bon niveau à se préinscrire pour le C2 afin qu'il puisse être créé. Certes, passer des examens n'a généralement rien d'agréable, voire réveille de mauvais souvenirs, mais il ne faut pas être timide et seulement bien choisir son niveau. On n'a rien à perdre et tout à y gagner !

Fin 2020 le compteur d'inscrits pour le C2 était à 82 sur les 150 requis. Que Katalin Kováts soit remerciée pour le travail considérable qu'elle a accompli pour qu'existe et soit reconnu l'examen en espéranto.

Toutes les informations se trouvent sur la page <https://edukado.net/ekzamenoj/ker>

Gilles Tabard

NOVAJ KURSOJ

Movada kurso: Klubo "Klubo Esperanto" de la Socia Centro "La Haŭt" en Oloron-Sainte-Marie (64400)

Por komencantoj kaj progresantoj (A2)
Instruisto: Guy Camy
1 fojon ĉiusemajne,
ekde la 1a de aŭgusto 2021
pliaj informoj:
<https://edukado.net/kursejo?kid=27326>
aŭ guy.camy@orange.fr

Movada kurso de "Espéranto Vendée" en La-Roche-sur-Yon

Por lerni esperanton, plibonigi vian esperantan kapablon ludante kune...
Maison de quartier des Forges
85 000 La-Roche-sur-Yon

Instruistoj: Victor COUTUTER, Lucette LEJEAN, Viviane LEJEAN, Patrice JOLY Stéphane ROBERT
1 fojon ĉiumonate,
ekde la 10a de oktobro 2021
pliaj informoj:
<https://edukado.net/kursejo?kid=273276>
aŭ <http://esperanto-vendee.fr>

Espéranto-Développement-45 obtient un agrément de l'Éducation nationale

Plus d'un an et demi après notre demande, l'association **Espéranto-Développement-45** vient d'obtenir l'agrément de l'Éducation nationale pour l'académie d'Orléans-Tours (retard en particulier dû au Covid-19). L'agrément est valable pour 5 ans. Nous espérons ainsi que nos actions dans les écoles, collèges et lycées seront facilitées.

Pour qu'une association nationale telle qu'Espéranto-France puisse être agréée pour la France entière, il faut que son activité soit nationale ou qu'elle couvre un nombre significatif d'académies.

D'où ma question : est-ce qu'il y a d'autres associations d'espéranto (locales ou régionales) qui sont agréées par l'Éducation nationale ?

Si la réponse est oui, nous pourrions rassembler les dossiers pour faire une demande d'agrément national. Si la réponse est non, mais que nous arrivons à montrer des activités complémentaires de l'enseignement dans plusieurs régions, ce sera aussi possible, mais plus compliqué.

Pierre Dieumegard

L'espéranto de nouveau chez Assimil !

Le 16 septembre marque le grand retour de l'espéranto dans le catalogue d'Assimil, avec *Les cahiers d'exercices Espéranto*.

Dans le même esprit que les autres cahiers d'exercices Assimil, les exercices proposés dans ce cahier ne nécessitent pas de connaissances préalables de la langue (même si les faux-débutants peuvent s'en servir pour réviser leurs connaissances). Plus qu'un recueil d'exercices, c'est bel et bien une méthode émaillée d'exercices ludiques et colorés qui mènent pas à pas vers un apprentissage de la langue en s'amusant. En tout 160 exercices répartis en 14 chapitres et richement illustrés.

Si vous êtes joueur, ce nouvel ouvrage vous ravira car l'auteur, Sébastien Erhard, s'est débrouillé pour faire des exercices les plus ludiques possibles, et a même intégré quelques jeux (à découper) à l'intérieur...

Un corrigé à la fin du cahier permet un apprentissage en toute autonomie. 128 pages, format 10 x 14 cm



Déjà plus de 105 000 francophones ont découvert l'espéranto grâce à Duolingo !

Entre juillet 2020 et septembre 2021, c'est plus de 105 000 francophones qui ont pu découvrir l'espéranto grâce à **Duolingo**.

